

Esperanto
V-19479/53 (1984)

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

AL NOVAJ
SUKCESOJ

MEM — 30 JAROJN
EN SERVO DE
LA PACO

NIA AMATORA
ARTAKTIVADO

E-TURISMO EN
PERSPEKTIVO

METODIKA
E-KONFERENCO

LA MONDO KANTOS
EN ESPERANTO

IMITINDA PAŜO

POEZIA PAĜO

ENLANDA MOVADO

DISTROJ





Mondpaca Esperantista Movado (MEM) 30-jara, eldonis Hungara MEM-Sekcio, Budapeŝto, respondeca eldonanto: **D-ro Imre Pethes**, 1983, 44 paĝoj.

Pasintjare la esperantistoj-pacdefendantoj celebris la 30-an datrevenon de la fondiĝo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Por noti tiun ĉi jubilean datrevenon, la Hungara MEM-Sekcio (transpreninte la torĉon el la manoj de la ĉeĥaj pacamikoj, kiuj okaze de la 15-a kaj 25-a datrevenoj de la fondiĝo de MEM, respektive en 1968 kaj 1978 eldonis la broŝurojn „Kio estas MEM“ kaj „Koncize pri MEM“), akceptis la taskon publikigi la broŝuron „Mondpaca Esperantista Movado 30-jara“. Tiu ĉi broŝuro, kompare kun la cititaj eldonaĵoj, estas iom pli ampleksa kaj pli enhaviĉa.

30 JAROJN EN SERVO DE LA PACO

La unua materialo en la broŝuro estas mesaĝo de la prezidanto de la Monda Packonsilio **Romesh Chandra**, titolita „Esperantistoj por la paco“. En ĝi la gvidanto de la plej aŭtoritata porpaca movado alte pritaksas la kontribuon de MEM al la batalo por paco, kontraŭ la milito, rasa diskriminacio kaj ŝovinismo, por forigo de ĉiuj aliaj specoj de perforto, kiuj minacas la pacajn kontaktojn inter la popoloj. Li rememorigas la komunan deklaron pri aktiva kunlaboro inter la Monda Packonsilio kaj MEM, subskribitan en oktobro 1972.

D-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM, revuante koncize la 30-jaran agadon de MEM, konkludas ke „*En la nuna tempo, kiam la tutan terglobon minacas la plej detrua milito, nia tasko estas pli grava kaj pli granda ol iam ajn antaŭe*“ kaj ke la MEM-anoj devas sekvi la vojon, difinitan de la Fonda Manifesto de la Mondpaca Esperantista Movado — „*la vojon de vero, justeco, libero kaj paco*“.

En sia artikolo „Jam 30-jara estas MEM“, la ĝenerala sekretario kaj fondinto de MEM **William Gilbert**, tuŝante la ideologian aspekton de la movado, substrekas, ke „*la movado preferas konkretan kaj konsekvencan pac-*

agadon“. La sama aŭtoro en alia artikolo — „Kiel naskiĝis MEM“, rememorigas la eventojn kaj la kaŭzojn, kiuj venigis al la fondo de MEM kaj emfazas la rolon de la pioniroj de MEM **Anton Balague**, **R. Ferdinand**, **Rudolf Burda** ka.

La honora prezidanto de MEM **Nikola Alekšiev** en artikolo „Sojle de la jubileo“ pritaksas la sukcesojn de MEM dum ties 30-jara ekzistado kaj substrekas la signifon de la solidareco de l'esperantistaro kun la Monda Packonsilio por plialtigo de la aŭtoritato de la monda esperantista movado. Li turnas atenton sur la fakton, ke „*La morala pozicio de la monda esperantista movado kreskas en la okuloj de amaso da neesperantistaj rondoj kaj medioj, kie oni ofte unuafoje aŭdas pri Esperanto kaj pri la streboj de la esperantistaro*“. Li substrekas la kontribuon de la ĉeĥaj kaj slovakaj pacamikoj al la agado de MEM (la artikolo estis unue publikigita en la ĉeĥoslovaka numero de „Paco“, 1982).

Plue la broŝuro entenas koncizan historian skizon pri MEM, verkitan de **Oldrich Knichal** kaj kompletigitan de **Sizilárd Bálint**, kaj la materialon „Ĉefaj trajtoj de la agadprogramo de Mondpaca Esperantista Movado“, kiuj donas ideon pri la karaktero, celoj kaj organiza strukturo de MEM. Tre grava estas la artikolo de **prof. S. N. Podkaminer**, la ŝatata forpasinta ano de la Internacia Komisiono de MEM, sub la titolo „Cu la pacmovado povas esti neŭtrala?“, represita kun mallongigoj el la broŝuro

„Kio estas MEM“, 1968). La respondo al tiu demando estas: *MEM estas strikte neŭtrala rilate ĉiujn ideologiajn problemojn, sed same strikte malneŭtrala rilate la problemojn de milito kaj paco, de rasa kaj nacia egalrajteco, de rasismo kaj ŝovinismo*.

La artikoloj „La virinoj por la paco“ de **Susanna Maĉkalova** (Sovetunio), „La paco egalas vivon“ de **Milada Hemerková** (Ĉeĥoslovakio), „Kiel la virinoj vidas la agadon de MEM“ de **Elma do Nascimento** (Brazilo) kaj „Esperantistoj kaj MEM“ de **Marie Turková**, estrino de Virina Komisiono de MEM (Ĉeĥoslovakio) pritraktas aparte la partoprenon de virinoj en la pacbatalo.

Krome, la broŝuro entenas la kanton „Estu paco“ de **László Szolod** laŭ la teksto de **Imre Szabó**, dediĉitan al la 30-jariĝo de MEM.

La broŝuro estas ilustrita per portretoj de iuj el la aŭtoroj, per fotoj, prezentantaj gravajn momentojn el la aktivado de MEM kaj per la blazonoj de la urboj, en kiuj okazis la fonda kaj la 9-a ĝenerala konferencoj de MEM.

Tiel verkita, la broŝuro estas taŭga informilo kaj propagandilo de MEM. Koran dankon al la Hungara MEM-Sekcio pro ĝia aperigo!

DIMITAR HAĜIEV,
Prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53

JANUARO

1 • 1984

AL NOVAJ SUKCESOJ!

HRISTO GOROV,
prezidanto de BEA

Fruktoriĉa estis la ĵus pasinta jaro. Kreskis la nombro de la asociaj membroj, funkciis centoj da kursoj, okazis amatora festivalo en Kazanlâk, kaj en Stara Zagora — scienc-praktika konferenco, dediĉita al la 60-a datreveno de la glora Septembra Ribelo. En Sofio pasis plensukcese la Tagoj de la Esperanta Kulturo. Por la unua fojo en Veliko Târnovo okazis Internacia Somera Esperanto-Universitato, kaj en la Internacia E-kursejo en Pisanica — seminario por tradukistoj kaj korespondantoj. Niaj aktoroj kaj kantistoj rikoltis brilajn sukcesojn en la Internacia Arta Vespero kaj la teatraj spektakloj en Budapeŝto. Ankaŭ la ekspozicio pri la 75-jara jubileo de BEA havis bonan sukceson dum la 68-a UK en Budapeŝto. Treege utila estis la turneo de membroj de BEA, kiuj en septembro pasintjare prelegis kaj koncertis en deko da sovetiaj urboj, interalie en Odeso, Erevano, Tbilisi, Taŝkento. Ankaŭ sovetiaj esperantistoj el Leningrado donis spektaklojn en kelkaj bulgaraj urboj.

La Bulgara Esperantista Asocio dum sia tuta ekzistado estis fidela al la ideoj pri interkompreniĝo kaj amikeco inter homoj de diversaj nacioj. Ja la esenco kaj celo de nia lingvo estas kontribui por forigo de ĉiuj baroj inter la popoloj. Konforme al tio ankaŭ dum la pasinta jaro ni havis karajn gastojn el multaj landoj, kiuj partoprenis niajn aranĝojn, interalie la Kurson pri Publika Parolado en Pisanica kaj la Renkontiĝon de Esperantistoj el Balkanaj Landoj en Bankja apud Sofio, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Esperanto.

Kelkaj ĵus eldonitaj en nia lando libroj, interalie la antologio „Septembro estigos majon“ kaj la romano „Vilaĝo Borovo“, pliriĉigos la bibliotekojn de la libroŝatantoj. Nova luksa kajero de „Bulgarino“ liveris interesan legaĵon al la esperantistinoj el multaj landoj.

Laŭ la jam aprobita jarplano de BEA, dum la vintro de la kurenta jaro okazos jarkunvenoj de la lokaj E-societoj, post kio sekvos la distriktaj konferencoj. En aprilo okazos en Plovdiv festivalo, dediĉita al la 40-a datreveno de la socialisma revolucio en nia lando. En majo sekvos la 36-a Kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj (IFEJ) en „Suna Bordo“ ĉe la Nigra Maro.

Dum tiu ĉi jubilea jaro grava aranĝo estos la scienc-praktika konferenco en Velingrad — urbo, kiu portas la nomon de la esperantistino Vela Peeva, mortigita de la faŝistaj gendarmoj. Dum la konferenco oni aŭdos referaĵojn, rakontojn kaj deklamaĵojn, vizitos terkabanojn kaj ekzekutlokojn de partizanoj. En oktobro oni celebros en Bansko — la naskiĝurbo de Nikola Vapcarov, lian 75-jaran jubileon.

Ankaŭ ŝatantoj de poezio havos la plezuron legi poeziaĵojn de revoluciaj kaj nuntempaj bulgaraj poetoj en la baldaŭ aperonta antologilo. Oni povos legi la romanon pri la heroo de Leipzig Georgi Dimitrov, kiu, post la liberiga decido de la tribunalo, devis batali kontraŭ la mardplanoj de la nazioj fronte kun la ĵifama Göring. En la jubilea jaro oni legos interesan skizon pri la esperantisto-partizano Diĉo Petrov, kiu, kiel vera internaciisto, transiris kun sia bataliono al la jugoslavaj partizanoj kaj kune kun ili batalis kontraŭ la germanaj okupantoj.

Do, al obstina laboro, al novaj sukcesoj dum la antaŭkongresa jaro, karaj amikoj! La 41-a nacia kongreso de BEA antaŭstaras en la somero de 1985 kaj la nuna jaro estas decida por ĝia brila okazigo!

Feliĉan novan jaron 1984!

Sanon, pacon kaj prosperon al vi ĉiuj, kiuj streĉe laboras por la feliĉa estonto de nia popolo!

NIA AMATORA ARTAKTIVADO

En nia lando post la popola revolucio en 1944 la amatora arto brile disfloris. Per la belarta¹ parolo, kanto, ludo kaj danco la liberigita popolo bezonis impete esprimi sian ĝojon, sian entuziasmon, sian certecon pri la hodiaŭa kaj morgaŭa tagoj.

Disfloris ankaŭ la esperantista amatora arto. Pri artaktivado komencis okupiĝi vaste la esperantistaro. Kulmino de tiu aktivado sendube estas la ĉiujaraj naciaj revuoj de la E-parolo kaj kanto kaj la recitaloj de Botev-poezio. Tio, kompreneble, tute ne signifas subtakson de tiu vivnecesa, konstanta, „ĉiutaga“ artaktivado, kiu tiel agrable variigas kaj riĉigas la vivon de niaj E-societoj ĉiuloke. Ĉi tie tamen pli akriĝas la atento antaŭ ĉio al la naciaj revuoj kaj recitaloj. Multo el tio, kion ni diros pri ili, validas grandparte ankaŭ por nia konstanta amatora artaktivado.

La naciaj revuoj de la E-parolo kaj kanto kaj la Botev-recitaloj firmiĝis jam kiel bonega tradicio. Ilin oni atendas kun intereso kaj malpacienco. Por ties preparo kaj okazigo niaj estraroj — Centra, distriktaj kaj societaj — donas ĉiam pli multe da atento kaj zorgoj. Ĉar por ĉiuj estas klare, ke tiuj ĉi aranĝoj estas ne nur grava interna esperantista afero, sed ili estas samtempe ekskluzive gravaj manifestadoj antaŭ la tuta ekstera socio. En tiuj ĉi aranĝoj centoj da bulgaraj samideanoj manifestas siajn kapablojn, sian animecon. Vere la revuoj kaj recitaloj transformiĝis en skolon de efika idea, estetika kaj lingva laboro. Nun la plej grava tasko estas decide plialtigi ties artnivelon. Jam fina tempo estas transiri de la bonaj konkludoj kaj utilaj rekomendoj al la bonaj faroj.

Vere ĉiu nova revuo kaj recitalo markas ian progreson. Sed tiu ĉi progreso estas tre modesta. La justeco postulas diri, ke nia amatora artaktivado serioze postrestas kompare kun la amatora artaktivado en la lando. Nun la Centra Komitato de BKP starigas antaŭ la tuta popolo la taskon decide plibonigi la kvaliton de ĉiu laboro en ĉiuj sferoj de la vivo. Tiu tasko validas centprocente ankaŭ por nia E-laboro: ni devas proklami senkompromisan batalon kontraŭ la primitivismo en nia asocia laboro, inkluzive de la amatora! Al tio nun alvokas nin ankaŭ la 40-jariĝo de nia Naŭaseptembra Revolucio.

La plej karakterizaj mankoj kaj malperfektaĵoj en nia amatora artaktivado estas vaste konataj, sed eble ilin subtakŝas ĝustetiuj, de kiuj reule dependas ties forigo. Tial estas necese ilin ripeti.

Antaŭ ĉio: nesufiĉa artismeco de la artak-

tivado. Ofte sur la scenejo manifestiĝas netolerebla grizeco kaj monotoneco, mankas ĉia artisma nervo kaj intonacio, kiu respondu² al la senco de la diraĵo, mankas konvenaj gesto kaj mimiko, kiuj kompletigu la efikon de la parolo, sugestu la senton, kiu estas postulata de la teksto. Iu plenumanto parolas tiel malklare aŭ sub sia nazo, ke oni apenaŭ povas lin aŭdi kaj kompreni, ni ne parolu pri ia efiko sur la publikon. Alia laŭte nur „diras“ la vortojn, sed tute ne deklamas, ne transdonas artisme la tekston; li nur „plenumas“, sed ne kantas sian kanton. La pozo estas rigida, la gesto — tede unuspecaj, parazitaj, ne konformaj al la teksto. Iam el la scenejo sin verŝas tia nenatura patoso, ke la publiko nur ironie ridetas. Aparte oni devas atenti ĉe la muntaĵoj: tie ofte mankas vigleco ĉe apartaj plenumantoj, mankas viveco kaj dinamiko, mankas kelkfoje sceneja konduto, nesufiĉa estas la proporcio inter la partoj de la tuto.

Dualoke: la prononco kaj la lingvaĵo. Sur la scenejo de niaj revuoj kaj recitaloj aŭdiĝas — sub la influo de la gepatralingvo — tre forta, nepermesebla malheligo de la neakcentitaj vokaloj, pro kio a sonas kiel *â*, o sonas kiel *u*, e kiel *i* (ekz. novâ, estâs, kamaradu Nikoluv ks.). Oni ne atentis pri la artikulaciado de la sono *l* — en la bulgara ĝi estas tre malmola, kaj en Esperanto ĝi estas meze mola (oni devas artikulacii ĝin per tuŝo de la langopinto al la supraj dentoj). L aparte pezas en la prefikso **mal** (malgranda, malbela ktp.). La amatori devas centfoje ekzerci sin prononci bone, kun meza moleco de l vortgrupojn kaj frazojn kiel: la malnova bulgara kulturo, mi parolas al vi, tio sonas kiel kanto ks. Kelkfoje oni erare prononcas **z** anst. **s** en vortoj kiel socialismo, entuziasmo ks. Iam oni malbone akcentas: nacio anst. nacio, Bulgario, anst. Bulgario ktp. Iufoje oni nekorekte akcentas la prepoziciojn **al**, **de**, **por**, **sur** ktp. Ne mankas okazoj, kiam oni tiel disŝiras la vortgrupojn en la frazoj, ke la senco fariĝas malfacile aŭ tute nekomprenebla. Ĉe kantado ofte la vortoj estas nekompreneblaj pro malbona prononco.

Kiuj estas la kaŭzoj pro tiuj malperfektaĵoj? Kiajn rekomendojn oni povas fari por ties forigo?

Antaŭ ĉio — la nesufiĉa tempo por sinpreparo. La programoj, per kiuj oni prezentiĝos en la revuoj, devas esti pretaj almenaŭ ĝis la fino de decembro, kaj la provludoj — almenaŭ en januaro. Tio estas aparte necesa por la kolektivaj programoj. Oni ne povas postuli de la plenumantoj altan nivelon, plenan sinkronecon de parolo, sono, movo, mimiko,

gesto ktp., se ilia programo ankoraŭ ne estas maturiginta por la scenejo. Ĉia rapideco kaŭzas nur trolaciĝon, malkontenton kaj malaltan kvaliton. Sur la scenejo oni ne devas aperi ne sufiĉe bone sin preparinte.

Ofte por la malalta kvalito kulpas la malbona elekto de la plenumantoj. Ne estas maloftaj la okazoj, kiam kiel plenumantoj estas engaĝataj tutaj kursoj aŭ klasoj. Alifoje la elekto de iu plenumanto okazas dank' al tio, ke li aŭ ŝi estas filo aŭ filino de amiko, najbaro, parenco aŭ de E-aktivulo. Por atingi bonajn rezultojn oni devas elekti nur la plej kapablajn en la arto reciti, kanti, oratori. Kaj krome: la arta tasko devas respondi al la naturo de la plenumanto (lirika, drameca, heroa ktp.), al ties voĉo, aĝo, ekstera aspekto, eĉ staturo. De ĉiu plenumanto oni devas postuli la maksimumon.

Grava kaŭzo por la malbona artkvalito estas la neĝustatempa certigo de kompetenta helpo fare de reĝisoro, artisto, muzikpedagogo, kaj por la lingvo — de bona lingvoposedanto. Oni ne devas resti ĉe tio: la kursgviganto instruas la lingvon, do li ankaŭ gvidu la artaktivadon! Ofte li tamen tute ne estas kapabla fari tion.

Kaŭzo de malaltigo de la kvalito povas esti ankaŭ la materialo enmetita en la programon. Oni ne devas preni kian ajn materialon, sed serĉi nur bonan, plej bonan materialon. En la


muntaĵoj la partoj devas esti proporciaj ka kunigitaj en bonan idean kaj estetikan tuton. La Centra Estraro de BEA prenis sur sin la taskon ĝustatempe prepari kaj dissendi konvenan materialon por ĉiu antaŭstaranta revuo. Kompreneble, oni ne devas limigi sin per tiu materialo.

Ekde la pasinta jaro estis akceptita la praktiko okazigi anticipan elekton de plenumantoj-amatoroj. Kompetenta komisiono devas aŭdi la programon en ĝia definitiva formo kaj allasi aŭ ne allasi ĝin al la Nacia Revuo. Tiu komisiono devas esti principa kaj preni siajn decidojn sendepende de aliaj konsideroj (premo fare de societa estraro aŭ amiko, timo ne ofendi iun ks.). La batalo por pli alta kvalito kiel ĉiu batalo havas siajn postulojn kaj povas okazi iuj kolizioj kun malnovaj kaj nekonvenaj jam konceptoj kaj kriterioj.

Aparte ni atentigas, ke oni jam devas likvidi la subtakson de la oratora konkurso, kiu estas bonega formo por instigi al preparo de novaj agitatoj, raportantoj, oratoroj, tiel necesaj al nia E-movado.


La batalo por alta kvalito de nia amatora artaktivado devas esti gvidata kun tia obstino, kun kia la mankoj kaj malperfektaĵoj ripetigas.

KUNĈO VALEV,
generala sekretario de BEA



Ankau ili preparas sin por la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto

LA MONDO KANTOS EN ESPERANTO



Hristo Gorov, prezidanto de BEA, dekoras la hordirektanton Dimitar Terziev per la Ora Insigno de BEA

La 28-an de novembro pasintjare, malgraŭ la tre malagrabla pluvo, la salono de legosocieto „Emil Sekerĝijski“ en Sofio estis plena. Kio igis tiom multajn homojn libervole forlasi siajn loĝejojn kaj veni tien ĉi? La evento meritis tian oferon — oni celebris la 5-jaran datrevenon de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj kaj la 60-an naskiĝtagon de ties direktanto Dimitar Terziev.

Kiel komponisto, hordirektanto kaj muzika pedagogo Dimitar Terziev penetris profunde en la infanan mondon. Li estas aŭtoro de pli ol 100 muzikverkoj — precipe kantoj por infana aŭditorio.

Merita rekompenco por lia valora agado estas la ordenoj „Kiril i Metodij“ — I kaj II grado, kaj multaj aliaj distingoj.

Pro liaj grandaj meritoj sur la esperanta kampo kaj lige kun lia 60-jariĝo Dimitar Terziev estis distingita per honora diplomo kaj per la Ora Insigno de BEA, kaj Borislav Popov, prezidanto de la ĥoro — per la Arĝenta Insigno de BEA.

Raporton pri la jubileuloj — ĥoro kaj hordirektanto — faris la konata kantisto-esperantisto Veselin Damjanov. Li tre emocie kaj atentokapte prezentis la vojon de Dimitar Terziev — modesta, sed talenta kreanto, kiu dank'al siaj laboremo kaj obstineco nun, sur la sojlo de sia sepa jardeko, de sia plej matura kreoperiodo, rikoltas tre riĉajn fruktojn. Inter la plej valoraj el tiuj fruktoj tamen, almenaŭ por la bulgaraj esperantistoj (al kies vicoj jam pli ol 25 jarojn apartenas Dimitar

Terziev mem) estas tiuj, kiuj estas ligitaj kun Esperanto.

En 1955, kiel studento en Sofio, Terziev konatiĝas kun Petko Arnaudov el Pazarĝik, tiam studento de matematiko, kiu kreas ĉe li intereson al Esperanto. Li partoprenas E-kurson en la universitato sub la gvido de prof. Stojan Guĝev, komencas korespondi kun eksterlandaj samideanoj, aliĝas al la studenta E-agado, kiu tiutempe estas sufiĉe vigla.

En 1966 D. Terziev formas malgrandan junulinan ĥoron el aninoj de la E-kurso en la lernejo de Publika Nutrado en Sofio. La saman jaron tiu ĥoro, sub lia gvido, sin prezentas dum la 51-a kongreso de UEA en Budapeŝto.

La sekvan jaron (1967) D. Terziev kreas la ĉambran virinan ĥoron „Esperanto“ (el la medio de sofiaj instruistinoj). Dank' al lia energio, aperas gramofondisko kun kvar kantoj de ĥoro „Esperanto“.

Intertempe, kunlabore kun Stefan Kiragiev, Jordan Markov kaj Nikola Nikolov, D. Terziev partoprenas la eldonon de „Flugas kanto tra la mondo“ — kantkolekto konsistanta el 62 bulgaraj kaj alilandaj kantoj, kies tekstoj estas tradukitaj en Esperanton.

Pli malfrue, lige kun la Internacia Jaro de Infanoj, Terziev kompilas la kantkolekton „Man-en-mane marŝu ni“, enhavantan 11 infankantojn en Esperanto. Li estas ankaŭ la kreinto de teksto kaj melodio de la populara kanto „Antaŭen, pabatalantoj“, kiun oni kantas en 14 lingvoj jam 30 jarojn.

Tre kara kreaĵo de la muzikisto kaj esperantisto Dimitar Terziev estas la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj, kiu jam atingis tre bonan sukceson dank'al la senlima sindonemo kaj entuziasmo de la ĥoristoj.

Jen koncize la historio de tiu ĉi ĥoro. La 9-an de majo 1978, laŭ iniciativo de Zora Oŝanska, dank' al la subteno de Ivan Keremidĉiev, grupo da esperantistoj fondis novan E-ĥoron, kiu devis daŭrigi la tradicion de la iama, ekzistinta antaŭ la 9-a de Septembro 1944 E-ĥoro, malpermesita de la faŝista ŝtatpovo.

Estas nepre necese substreki, ke la ĥoron iniciatis kaj fondis virinoj: Zora Oŝanska, Elena Cvetkova, Nedka Georgieva, Zvezdica Petrova, Venera Dobroslavska, Radka Nikolova, Margarita Kostova, Bojanka Drajeva.

La unua sinprezentado de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj okazis la 26-an de julio 1978 en la Domo de Sovetia Scienco kaj Kulturo, dum renkontiĝo de bulgaraj kaj sovetiaj esperantistoj en la antaŭvespero de la 63-a UEA-kongreso en Varna, kaj ankaŭ dum la kongrestagoj mem.

Por la ĥoristoj estas organizitaj du E-kursoj — por komencantoj kaj por progresintoj. Al la ĥoro aliĝas novaj kantistoj, kreskas la nombro de basuloj, kiuj en la komenco estas nur kvar... La ĥoro stabiligas organizon kaj arte... Venas nova akompanantino — Margarita Stefanova. La ĥoristoj jam havas specialajn koncertajn kostumojn. Komenciĝas streĉa preparlabo-

ro por memstara koncerto, dediĉita al la 40-a jubilea kongreso de BEA en Plovdiv kaj al la 1300-jara datreveno de la bulgara ŝtato.

La 23-an de junio 1980 la ĥoro donas memstaran koncerton por la partoprenantoj en la 40-a jubilea kongreso de BEA en Plovdiv.

La 5-an de junio 1982 la ĥoro koncertas en la Popola Palaco de Kulturo „L. Jivkova“ en Sofio dum la Tagoj de E-kulturo'82. (Tiu ĉi koncerto estas filmita).

La 30-an de novembro 1982 la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj partoprenas la regionan revuon de la VI Respublika Festivalo de Amatora Artagado kaj okupas unuan lokon inter la ĥoroj en dua Sofia regiono.

Dum la pasinta jaro, la 1-an de aŭgusto 1983, la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj partoprenis la Unuan Internacian Festivalon de E-ĥoroj dum la 68-a UEA-kongreso en Budapeŝto kaj okupis lokon inter la kvar premiitaj ĥoroj.

Solistoj de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj dum la 5-jara periodo de ĝia ekzistado estis Karamfilka Adamova, Gizela Dande, Stefan Paskulov, Stanka Petkova, Vilhelmina Kapitanska. Kiel solistoj sporade aperis ankaŭ la profesiaj kantistoj-esperantistoj Maria Angelova, Veselin Damjanov, Dimităr Denĉev, Rosica Janĉeva.

Nun la ĥoro nombras ĉirkaŭ 40 personojn. Ĝi eltenis la elprovon de la tempo kaj pruvis sian rajton de ekzistado.

Post la oficiala parto la ĉeestantoj havis la plezuron ĝui riĉenhavan koncerton de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj. Amasego da belaj floroj estis la tributo de la publiko al la ĥoristoj kaj al ilia sindona gvidanto Dimităr Terziev.

Apogante sin sur sia sperto el la praktiko, Dimităr Terziev estas kategorie, ke la kanto proksimigas la homojn, sendepende de iliaj nacieco kaj konceptoj. Tiun veron jam konfirmis la tri brilaj prezentoj de kantistoj el diversaj landoj en la Internaciaj Esperanto-Kongresoj en Stokholmo, Antverpeno kaj Budapeŝto. Tiu eksperimento por kreo de Internacia Esperanto-Ĥoro dum la universalaj kongresoj donas bonegajn pozitivajn rezultojn kaj ĝi estas unu el la plej gravaj manifestiĝoj de Terziev kiel ĥordirektanto kaj esperantisto.

Unufoje en la historio de la UEA-kongresoj, en Stokholmo 1980 li sukcesis krei internacian ĥoron, kiu dum la muzika paŭzo ĉe la fermo de la kongreso sin prezentis antaŭ la kongresanoj per malgranda programo. Unu jam delonge dordotata revo de la esperantistoj realiĝis kaj ties realiganto estis bulgaro! Por mi (Veselin Damjanov — *Noto de la Red.*), kiu tiam estis en la halo, tiu ĉi sinprezentado estis evento granda — ja tute ne estas facile por ĥordirektanto nur en 4—5 tagoj formi ĥoron el voĉoj, kiujn li neniam aŭdis, harmoniigi ilian sonadon. . . Pro tio oni tiam rilatis skeptike kaj ne kredis, ke tiu improvizita ĥoro havos la kuragon aperi sur la podio. Oni tamen ne sciis, ke la ĥordirektanto D. Terziev posedas grandegan laboremon, ambicion, sperton kaj kuragon, ke li gajnis la korojn de siaj ĥoristoj. . .

Tiam revuo „Esperanto“ skribis: „Agrabla surprizo de la kongreso estis la „Internacia Ĥoro“, kiu formiĝis dum la kongresa semajno sub la gvidado de la bulgara muzikisto Dimi-

tăr Terziev“.

Kaj „Heroldo de Esperanto“ ekkrias: „Ĥoro el kongresanoj — unikaĵo! Por unua fojo en la historio de la kongresoj. . .“

La dua sinprezentado de la Internacia Ĥoro en Antverpeno, Belgio (1982) jam ne estis tiel spontana — D. Terziev anticipe sendis al ĉiuj ĥoristoj la notojn. La programo estis entuziasme akceptita de la kongresa publiko.

Dum la pasintjara 68-a UEA-kongreso en Budapeŝto la Internacia E-Ĥoro en plej multnombra konsisto (80 kantistoj el 27 landoj) partoprenis la programon antaŭ 4000 kongresanoj. Interalie ĝi plenumis speciale verkitan por la kongreso kanton „Budapeŝto vin brakumas“ kaj kanadan kanton honore al la UEA-kongreso en Vankuvero.

Por Dimităr Terziev, gustuminta la fruktojn de sia laboro sur internacia scenejo, eksentinta la entuziasmon de la bunta multnacia publiko, venas tagoj de novaj kreaĵoj, de obstina laboro por preparo de konvena programo por la sekvonta internacia forumo de la esperantistoj. Rigardante en la estontecon, li vidas la purajn animojn kaj la malfermitajn korojn de la ordinariaj homoj el diversaj landoj, kiuj estas pretaj ekkanti en sama ritmo en la nomo de paco kaj komunaj intereso.

La realecon Terziev vidas en la ĝermoj de la jam okazinta infana iniciato de liaj edukitoj el la Nacia Eksperimenta Lernejo en Gorna Banja — antaŭstaras la renkontiĝo de infanoj-esperantistoj enkadre de la Internacia Infana Asembleo „Standardo de la Paco“. Tiu unua iniciato havas helajn perspektivojn, ĉar la infanoj el diversaj landoj trovas en Esperanto la rimedon por interkomunikiĝo. Tiam la Asembleo pli facile fariĝos internacia. Terziev kredas en tiu proksimiĝo de la Infana Asembleo al Esperanto. Kaj tio signifas, ke la mondo nepre kantos en Esperanto.

**DIMITĂR* MUTUŜEV
VESELIN DAMJANOV**



Dimităr Terziev — direktanto de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj, dum la solena koncerto.

Fotoj: Venelin Vitski

TRI HELAJ NOMOJ...



Todor Angelov Kolarov

Nikola Petrov Velkov

Angel Georgiev Čaušev

Ili estas filoj de heroa Batak, Batak, kiu donis plej multajn viktimojn ĉe la frakaso de la Aprila Ribelo en 1876. Tiu sama Batak, kies plej karaj gefiloj per amasa perarmila kunpuŝiĝo kun la polico metis la komencon de la legenda partizana taĉmento „Anton Ivanov“ kaj donis novajn viktimojn en la kontraŭfasista batalo.

Inter la fondintoj de taĉmento „Anton Ivanov“ estis ankaŭ la komunistoj-esperantistoj Todor Kolarov, Angel Čaušev kaj Nikola Velkov.

La 2-an de septembro 1941, post suksesa kunpuŝiĝo kun la malamiko kun celo liberigi la arestitan Todor Kolarov, la membroj de la batalgrupo, ĉe-kape kun Angel Čaušev, ekiras laŭ la hajdutaj vojoj kune kun la liberigita Todor Kolarov. Baldaŭ al ili aliĝas Nikola Velkov kaj du liaj kamaradoj. La grupo kreskas al naŭ personoj.

Todor Kolarov (1897—1944) estas unu el la fondintoj de la partia organizaĵo en Batak (1919) kaj poste — sekretario de la komunista junulara organizaĵo. En 1922 li finstudas la partiajn kursojn en Plovdiv, kaj en 1923 — ankaŭ la partiajn kursojn ĉe CK de BKP. Persekutata de la faŝista ŝtato pro partopreno en la Septembra Ribelo kaj en la politikaj eventoj en 1925, li estas devigita elmigrigi en Sovet-Union. En la sovetlanda li finas superan klercon, okupas gravajn postenojn, aktive partoprenas la socialisman konstruadon.

Reveninte Bulgarion en 1937, dank' al sia riĉa sperto de partia funkciado, Kolarov aktivigas la partian kaj la junkomunistan organizaĵojn, laboras por unuigo de ĉiuj progresemaj kaj demokratiaj fortoj ĉirkaŭ la partio. Per siaj senperaj kaj sinceraj rakontoj pri la ab-

negacio de la sovetiaj laboristoj, kolhozanoj kaj intelektuloj ĉe konstruado de la nova vivo, li gajnas la korojn de junaj kaj maljunaj aŭskultantoj, priskribas la helan estonton de nia lando post la venko de la socialisma revolucio, la helan estonton ankaŭ de sia multe suferinta heroa Batak. Por tiu ĉi hela estonto li oferis sian vivon en la batalo.

Angel Čaušev (1903—1944) estas iniciatinto kaj fondinto de l'organizaĵo de la Laborista Partio en Batak (1928), kaj li estas ĝia unua sekretario. En la tago de l'insida agreso de faŝista Germanio kontraŭ Sovetunion, li eldiras la flugilhavajn vortojn, kiuj baldaŭ ĉirkaŭiris la tutan landon: „De la nuna tago ni estas soldatoj de la Ruĝa Armeo“. Kaj li restis fidela al tiu ĉi devizo ĝis la fino de sia heroa vivo. Kiel partizano Čaušev manifestas ekskluzivan heroecon, maloftan konsideremon, mirindan bravecon en la batalo, poezian talenton, korvarmon kaj helpemon, scipovas kanti kaj gajni la korojn de la partizanoj. La 10-an de marto 1944, kiam la taĉmento estas frakasita, ĉirkaŭite de la malamikoj, la brava partizano konservas por si la lastan kuglon.

Nikola Velkov (1914—1944), filo de unu el la fondintoj de la partia organizaĵo en Batak, tre juna komencas aktive partopreni la batalojn de la junkomunista organizaĵo. De 1936 ĝis 1941, kiam li estiĝas partizano, li estas sekretario de la junkomunista organizaĵo en Batak kaj plenumas tre ampleksan organizan laboron. Velkov havas apartan meriton por la unuigo de la lernanta junularo en Batak ĉirkaŭ la partio.

Ĉiuj ili — Čaušev, Kolarov kaj Velkov — estis aktivaj propagandantoj de Esperanto.

Todor Kolarov jam kiel junulo lernas kaj propagandas Esperanton. Li uzas ĝin en Grek-

lando, kaj post sia elmigro en Sovetunion plu lernas kaj aplikas ĝin. Post sia reveno en Bulgario li kuraĝigas la junularon en Batak lerni Esperanton kaj korespondi kun esperantistoj el USSR kaj el aliaj landoj.

Plej grandan aktivecon en la lernado, propagando kaj apliko de la lingvo manifestas Angel Ĉauŝev. Li gastigas multajn alilandajn esperantistojn, en tiu nombro ankaŭ hungaran profesoron-arkeologon, kiu pro sia sanstato pasigis la feriojn en Batak. Estus interese ekscii, kiu estis tiu profesoro — malamiko de la germana kaj hungara faŝismo.

Kun alilandaj esperantistoj korespondis ankaŭ Nikola Velkov, kiu, estante gvidanto de la junkomunista organizaĵo, interesigis la gejunulojn en Batak pri lernado de Esperanto.

Iuj el ili same pereis en la kontraŭfaŝisma batalo.

Instruanto de ĉiuj esperantistoj el Batak estas Petâr Toŝkov¹ — la unua disvastiganto de la socialismaj ideoj en Batak jam en la komenco de nia jarcento kaj partoprenanto en multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj. Liaj lernantoj Todor Kolarov, Angel Ĉauŝev kaj Nikola Velkov levis sur novan idean pozicion la lernadon kaj la aplikadon de Esperanto, montrante la ĝustan vojon ankaŭ al la sekvaj esperantistaj generacioj

Prof. JANKO G. JANEV

¹En n-ro 7/1983 de „Bulgara Esperantisto“ estis publikigita artikolo „La unua alaŭdo“ pri la vivo kaj agado de la revoluciulo-esperantisto Petâr Toŝkov el Batak.

FORPISIS ZORA ĤANS



La 26-an de oktobro 1983, post mallonga malsanado forpasis Zora Ĥans. La esperantistoj el Varna kaj el la distrikto perdis sian amatan Esperanto-patrinon. Multaj geurbanoj, esperantistoj kaj infanoj kun freŝaj aŭtunaj floroj kaj larmoplenaj okuloj akompanis sian amatan bonkorulinon ĝis ŝia lasta ripozloko. . . Georgi Dolapĉiev, oficiala reprezentanto de CE de BEA, kondolencis la funebrajn familiojn de Ivan Dimĉev (Ĥans), de ŝia filo, la denaska esperantisto doc. ing. Mitko Iv. Dimĉev — prezidanto de DE de BEA en Varna, kaj ŝian filinon Aŭgusta (Guta) Stanĉeva.

Zora Ĥans estis esperantistino de 1910. Veterano de la bulgara kaj internacia E-movado,

honora membro de CE de BEA, membro de DE de BEA en Varna, honora prezidanto kaj kunfondinto de E-societo „Albatroso“ en Varna, faka delegito de UEA pri edukado en Varna, multjara pedagogo — ŝi estis ankaŭ aŭtoro de multaj artikoloj pri edukado, de recenzoj ka. en Esperanto kaj en bulgara lingvo. Iuj el ili aperis en „Bulgara Esperantisto“ sub pseŭdonimo Avrora Klajn kaj Stela Morbilli. Ŝi verkis ankaŭ lernolibron de Esperanto.

Malgraŭ la persekutoj de la faŝistaj regantoj Zora Ĥans restis fidela al siaj progresemaj politikaj ideoj. En 1925, kune kun sia patro, la instruisto Mladen Georgiev kaj sia fratino Vera Makedonska, ŝi estis eksigita, „kiel komunistino“, por ĉiam el ĉiuj lernejoj. Tiu senlaboreco daŭris 19 jarojn, ĝis la tago de liberigo de nia lando el sub la jugo de faŝismo en 1944.

Ĝis sia lasta spiro Zora Ĥans laboris senlace por la idealoj de la E-movado.

La Stata Soveto de PR Bulgario per dekreto de la 15-a de aŭgusto 1978 distingis Zora Mladenova Ĥans per ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado, lige kun ŝia 80-jariĝo kaj pro ŝia multjara aktiva laboro en la Bulgara Esperantista Asocio.

Ni rememoru ŝiajn vortojn: „Nun mi penas malrapidigi la paŝojn de mia vivo por povi ankoraŭ ĝoji pri la supreniro de mia socialisma patrolando. Tutan vivon mi batalis sub la verda kaj la ruĝa steloj sur la standardoj de Zamenhof kaj Lenin. Kaj mi estas feliĉa.“

Nia kara kaj amata Zora eterne vivos en niaj koroj!

Doc. GEORGI DIMOV

POEZIA PAĜO

AGLINO

Al Zora Ĥans

Atlings Vi honoran aĝon,
Sed restis juna Via kor'!
De la okuloj brilas saĝo,
De l'okdekjaroj brilas glor'!

Vi estas part' de l'historio
De nia kara Esperant',
Al viv' kaj mort' kun la Partio
Ligita lingva batalant'!

Kiel nomi Vin, ho Panjo?
Aglino forta estas vi!
Ĉar sub flugiloj Viaj, panjo,
Elkreskis nia kompani'!

Arigis ĉirkaŭ Vi kun amo
Generacioj preskaŭ kvin!
Al ĉiuj donis slan flamon
Vi — vera esperantistin'!

Kaj brulos tiu flam' ofera —
Aglino, Via heredaĵ' —
Pli alta ol altaro tera,
Pli daŭra ol la homa aĝ'!

DIMITAR DIMOV

KAREGA MEM

Malgraŭ la ambicio de l'agresar'
Esperantistaro tutmonda ĉiam batalas,
Marŝas antaŭen por savi la Homar'!

Jam pasis tridek jaroj,
Tridek jaroj. . .

Sed mil milojn da malfacilaĵoj
Vi ja glorie transpasas
Luktante, via koro ne lacas.

El ĉiuj terglobaj anguloj, oni aŭdas
Vian vokon, kion oni laŭdas.
La bonajn homojn vi urĝe apelas
Kaj ilin urĝe starigas
Kune bataladi kontraŭ imperiismo,
Kontraŭ faŝismo —
Per Esperanto.

Ni salutas vin, ho MEM karega,
Via celo grandega
Estos ĉiam nia kompasos.

HOANG MINH PHUNG,
Vjetnamio

FELIĈO

Vivmaterion mi estimas. . .
Sed horo de disiĝo venos. . .
Kaj tiun horon mi ne timas:
ĝermadi daŭros niaj semoj!

Procedo estas ĝi de la ekzisto
kaj leĝ' eterna de l'Naturo.
Feliĉa, kiu en persisto
konstruas homan progresuron!

Persist' tamen diverskoloras:
per tutpurigo putron hake,
per flugo tra la kosmaj foroj,
per streĉlaboro dum atakoj!

Altcela lukto bolas ĉie:
por regi mondon pac' revata!
Forĵetas ni burĝkalumniojn,
ke hommilitoj estas fato!

Nepidoj, kluj dum Estonto
konstruos homan vivon tiel,
ke ne inundu malamfontoj
sur miraj revoj la iliaj,

sendube lukton bravan benos
por nobla kontribu' plej granda —
estonta mondo plu ne tenu
militarmilojn en la manoj!

Kaj hommilitoj malaperos
eĉ en infanaj songoj, ludoj.
Iliaj roloj kaj aferojn
nur en muzeoj oni studos.

Pri mia vivo mi trankvilas:
ne pasis vane, senagece!
Mi penis esti popolfilo
kaj servi la popolon dece!

De ĝi mi faris min erero:
kun ĝi faladis, ribelbolis
dum jaroj nigraj de l'sufero,
dum jaroj venkaj de la gojo.

Por mi — la homo ordnara,
ja tio estas mia riĉo.
Ne pasis vane miaj jaroj!
Kaj jen: mi estas plenfeliĉa!

GEORGI DIKOVSKI

AL MIA PANJO

Fore en vilaĝo panjo sidas sola,
kiel bird' maljuna — trista, senkonsola.
Siajn etajn idojn vane ŝi atendas,
pro illa flugo el la nest' ŝi plendas. . .

Ege mi sopiras tien jam reveni,
en la patra domo panjon ĉirkaŭpreni!
Volas mi, ke panjo varme kaj sen ĉeso
per tremantaj manoj milde min karesu. . .

Ŝi min ree kisu kun feliĉa ploro,
pri junec' vivigu fora rememoro;
en la kor' degelu la dolorkruelo —
ne plu sola estu mi sub la ĉielo!

T. ŜOŜEV

(El bulgara tradukis la aŭtoro mem)

KIU UZAS „SLAVISMOJN“ EN ESPERANTO?

En *Bulgara Esperantisto* (4/1983, p. 11) Ljubomir Miĥajlov refutas aserton de István Nagy (*Budapeŝta Informilo*, 8/1982), ke certa vortordo estas nelogika. L. Miĥajlov prave karakterizas tiun lingvouzon kiel stilan trajton de slavaj lingvoj kaj montras, ke la hungara esperantisto misinterpretis unu el la ekzemplaj frazoj, kiujn li ĉerpis el *Bulgara Esperantisto*. Eĉ se tiu vortordo estas nekutima al parolantoj de kelkaj lingvoj, tio ne signifas, ke la enhavo estas nekomprenebla aŭ miskomprenbla. Povas esti, ke iuj legantoj devas du-tri fojojn legi tiajn frazojn, sed ili apenaŭ estas nelogikaj pro tio. L. Miĥajlov detale pritraktas tiun aspekton de la argumentado de I. Nagy. Tie ĉi mi deziras substreki alian eraron en la prezentado de la kritikanto, ĉar li diras, ke temas pri slavismo, t.e. karakteriza apartaĵo de la slava lingvo-grupo. Sendube tiu vortordo ofte troviĝas en verkoj de esperantistoj, kies gepatra lingvo estas unu el la slavaj lingvoj, sed ĝi ne estas uzata ekskluzive de slaveparolantoj. Jen kelkaj citaĵoj ĉerpitaj el lernolibro verkita de germanlingvulo.

1. Vi sentis ŝian embarason kaj invitis ŝin ludi kun vi, por ke ŝi sentu sin pli bona kaj almenaŭ de unu el ni akceptita.

Pli rekta esprimmaniero estas: . . . ŝi sentu sin pli bona kaj akceptita almenaŭ de unu el ni.

2. Tamen je militfino Moses Kaver eksciis, ke ĉiuj liaj iamaj sklavoj malaperis, escepte de pro kokluŝo severe malsana knabo. . . . Inter „escepte de“ kaj „knabo“ venas kvar vortoj, kiuj pli ĝuste devas sekvi „knabo“ jene: . . . escepte de knabo severe malsana pro kokluŝo. . .

3. . . . prefere ligu ilin per en gluon trempitaj ŝtofistrioj. Oni atendas post la prepozicio „per“ substantivon indikantan la aĵon, kiun oni uzu por ligado, sed interrompas tiun sinsekvon prepozicio kun alia substantivo. Oni reverku la frazon, por ke „ŝtofistrioj“ tuj sekvu „per“: . . . prefere ligu ilin per ŝtofistrioj trempitaj en gluon. (Rimarku: estas pli ĝuste diri „en gluo“.)

Ni daŭrigu nian esploron pri tiu ĉi „slavismo“. Ne nur germaneparolantoj skribas kiel slavo; ankaŭ parolantoj de la hungara lingvo same pekas. Estas ja strange, ke I. Nagy pre-

teratentis tiun stilan malglataĵon de la hungara dialekto de Esperanto. Ekzemploj kiel la sekvaj abundas en ĉiuj publikigaĵoj.

4. . . . li vivtenis sin en fabriko, sed firme rifuzis logajn invitojn de aristokratoj, iĝi arme-komandanto favore la tronon reokupi deziranta eksreĝo Karlo la 4a.

Gustigo: . . . favore la eksreĝo Karlo la 4a, deziranta reokupi la tronon.

5. La homo. . . eĉ ne pensas. . . ke laŭ la kreanta laboro kaj en futuron montrantaj planoj de J. Beszédes ekiris la naturon transformanta lukto kun la fortoj de la spitema naturo. Drasta reverkado estas bezonata: . . . laŭ la kreanta laboro de J. Beszédes kaj liaj planoj montrantaj en futuron, ekiris la naturtransforma lukto kun la fortoj de la spitema naturo.


6. Tial ŝajnas dankinda tiu ĉi detala, tamen ne tre longa informo, kiu malkovras multajn interesajn flankojn de la antikvaj trajtoj ankoraŭ gardanta popolo.

Inter la natura sinsekvo „la. . . popolo“ staras kvar vortoj, kiujn oni metu poste: . . . la popolo ankoraŭ gardanta antikvajn trajtojn.

Estas evidente, ke I. Nagy ne scias, ke lia samlandano, Kolomano Kalocsay, antaŭ du jardekoj okupigis ĝuste pri tiu ĉi stila fenomeno (v. „Lingva Rastado“, *Hungara Vivo*, 4/1964, p-oj 15–16). Li skribas pri vortordo „ĉe la suplementitaj epitetoj, kiu ekzistas nur en la hungara kaj germana lingvoj, sed estas fremda al ĉiuj lingvoj aliaj.“ Kalocsay ĝustigas kelkajn frazojn, same kiel mi faris ĉi-supre, kaj donas jenan konsilon: „Oni devus sin teni al la regulo, ke post „la“ staru ĉiam „peza“ vorto t.e. substantivo, adjektivo aŭ adverbo, sed neniam prepozicio, ĉar tiam la kompatinda „la“ pendas iel en la aero, ne sciante, kien ĝi propre apartenas.“ Finante sian artikolon, li klarigas, ke en liaj ĝustigitaj frazoj, „ĉiu frazelemento staras apud tiu, al kiu ĝi senpere rilatas. Kaj ĝuste tio faras la parentezajn strukturojn malpli pezaj kaj pli facile kompreneblaj, eble eĉ por hungaro kaj germano.“

Estas rimarkinde, ke Kalocsay tute ne atribuas mallogikecon al tiaj frazoj kaj eĉ ne karakterizas ilin kiel slavismojn!

BERNARD GOLDEN



Progreso de la organizita E-Turismo

La IX Internacia Foiro de Esperanto-Turismo okazis en Pollando en la lastaj dek tagoj de oktobro 1983. Partoprenis organizantoj kaj aktivuloj de la E-turismo el 16 landoj: Anglio, Belgio, Bulgario, Finnlando, GDR, FRG, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando, Svedio, Nederlando, Turkio, Rumanio kaj Usono.

La foiro komenciĝis en Lodzo, kie infanaj kaj junulaj E-grupoj kantis, deklamis kaj dancis enkadre de la revuo „Opera-83“.

La interparoloj kaj la subskribo de interkonsentoj pri interŝanĝo de grupoj okazis en la bela feria loko Venecja, situanta en departemento Bydgoszcz.

Estis konstatite, ke en 1983, malgraŭ la streĉita politika situacio en la mondo, la organizita E-turismo evoluis kaj akiris novajn poziciojn.

Post viglaj diskutoj, en tradicia amika atmosfero estis akceptitaj jenaj gravaj decidoj:

— starigo de Turisma Servo „Esperanto-tur“ ĉe „Monda Turismo“ kun sidejo en Pollando — Bydgoszcz;

— la bulteno „Esperanto-Turismo“ ekde 1984 estos eldonata kaj administrata en Pollando;

— la Internacia Esperantista Pacfonduso, starigita en marto 1983, havos prezidantaron kun reprezentantoj el Britujo, Sovetunio, Usono

kaj Pollando, kiuj prizorgos la evoluon de pacaj internaciaj kontaktoj. La sola kaj plej grava celo de la pacfonduso estas pliintensigo de la kontaktoj inter la popoloj pere de Esperanto.

— la venonta X Jubilea Internacia Foiro de Esperanto-Turismo okazos en Bydgoszcz — Pollando. Ĝi daŭros 45 tagojn, inkluzive la planitan aŭtobusvojaĝon Eŭropo-Hindio.

— por plibonigi la kunlaboradon kun UEA, la estraro proponis, ke dum la sekvonta konferenco en 1984 „Monda Turismo“ fariĝu aliĝinta asocio al UEA;

— oni organizos konkurson „Esperanto en turismo“, kies regularo estos aldone aperigita.

Ciuj partoprenantoj esprimis sian kontentecon pri la reklammaterialoj (multkoloraj kalendaroj, poŝtkartoj kaj afiŝoj) eldonitaj de la Internacia E-Kursejo en Bulgario, kaj esprimis deziron mendi la eldonon de similaj materialoj ĉe ni.

La IX Foiro de Esperanto-Turismo'83 estis organizita kaj realigita je alta profesia nivelo, kun partopreno de reprezentantoj de vojaĝoficejoj el 8 landoj.

Ciuj partoprenantoj esprimis dankon ala dommastroj pro la bona organizado, interesaj programeroj kaj ekskursoj.

NIKOLA NIKOLOV,
ĝenerala sekretario de „Monda Turismo“
ANGEL TODOROV,
ĝenerala direktoro de IEK, Bulgario

III NACIA KONFERENCO DE MEDICINISTOJ-ESPERANTISTOJ

La konferenco okazis en urbo Loveĉ la 19-an de novembro 1983. Ĉeestis reprezentantoj de 8 medicinistaj E-societoj kaj de iuj distriktaj estraroj de BEA. La konferenco havis precipe organizan-metodikan karakteron.

D-rino Tjuran Omer faris kritikan analizon de la ĝis nun aperintaj n-roj de „Saninformoj“ kiel cirkuleroj de Bulgara Medicinista E-Sek-

cio. Si substrekiis la relative riĉajn medicinajn informojn, novaĵojn el la vivo de medicinistaj E-societoj kaj sanitarajn informojn el eksterlando. Dum la pridiskuto oni faris multajn utilajn kaj celkonformajn proponojn por plibonigo kaj pliriĉigo de „Saninformoj“.

La prezidanto de la Medicinista E-Sekcio

ĉe BEA prof. Kiril Popov informis pri la kun-sido de Universala Medicinista E-Asocio dum la 68 UK en Budapeŝto kaj raportis pri la ĝisnuna organiza agado de medicinistoj-esperantistoj en Bulgario. Li prezentis la planon por 1984 kaj la antaŭstarantajn taskojn ĝis 1987, kiam oni festos la 100-jariĝon de Esperanto.

Post serioza diskutado estis akceptitaj jenaj pli gravaj decidoj:

— okazigi la IV Nacian Konferencon de Medicinistoj-Esperantistoj en Bulgario la 12-an, 13-an kaj 14-an de oktobro 1984 en la Internacia E-Kursejo en Pisanica. La konferenco estos dediĉita al la 40-jariĝo de la socialisma sanprotektado en Bulgario. Partoprenos ankaŭ gastoj el eksterlando. (La V Nacia Konferenco de Medicinistoj-Esperantistoj oka-

zos en Sofio dum la 41-a Kongreso de BEA en 1985).

— eldoni plenan adresaron de medicinistoj-esperantistoj por faciligi fakan internacian komunikadon

— starigi antaŭ CK de la Sindikato de Medicinistoj la demandon pri dua ripozgrupo por elstaraj medicinistoj-esperantistoj

— okaze de la 100-jariĝo de Esperanto ĝis 1987 estu organizitaj medicinistaj E-societoj ĉe ĉiuj distriktaj malsanulejoj en la lando

— okaze de la jubileo de Esperanto oni efektivigu la rekomendojn de la IV IMEK (Poprad'83) pri enkonduko de Esperanto en la medicinistajn mediojn, prelegi en Esperanto pri sciencaj esploroj dum internaciaj kongresoj kaj konferencoj kaj varbi novajn sanlaboristojn por nia E-movado.

K. P. P

IMITINDA PAŜO

Por plibonigi la instrulaboron en la lernejoj, la Metodika Centro ĉe la Urba Estraro de BEA en Sofio ĉiam strebas variigi la formojn de laboro. La zorgoj por preparo de E-instruistoj staras kiel tasko unua. Sed bedaŭrinde ni konstatis, ke la direktoroj de lernejoj, kiuj devas helpi nin, tre ofte tute ne estas informitaj pri Esperanto. Tial la Sofia Urba Estraro de BEA organizis en novembro 1983 tritagan seminarion por direktoroj, vicedirektoroj kaj reprezentantoj de Konsilantaroj de Popola Klerigo el la ĉefurbo. La seminario okazis en la Internacia E-Kursejo en Pisanica, apud Smoljan. Partoprenis 15 direktoroj. En amika etoso ili ricevis riĉajn informojn pri la E-movado en la tuta mondo kaj en Bulgario. La devizo de la seminario estis: „La patriotisma kaj internaciisma edukado kaj Esperanto“.

Pri Esperanto kiel solvo de la problemo pri internacia lingvo parolis Kunĉo Vălev — ĝenerala sekretario de BEA kaj prezidanto de la Instruista Sekcio ĉe BEA. Li klarigis ankaŭ la celojn kaj taskojn de la esperantistoj kaj la instruon kaj edukon valoron de Esperanto en la lernejoj.

Petăr Todorov — vicprezidanto de BEA, rakontis pri UEA, pri la internacia agado de BEA ktp.

Pri kelkaj ĉi-jaraj internaciaj E-arangoj (la internacia konferenco de ILEI en Portugalio, la internacia pedagogia seminario en Gjuĵa, Hungario, la Tago de Lernejo en kadre de UK en Budapeŝto rakontis Marin Băcev,

ĉefmetodikisto de E-instruado ĉe CE de BEA kaj sekretario de la Instruista Sekcio.

La ĝenerala direktoro de la Internacia E-Kursejo Angel Todorov konigis al la seminarianoj la agadon de la Kursejo.

Ĉio ĉi montrigis tute nova, preskaŭ nekonnata kaj tre interesa por la gastoj-neesperantistoj. Ili admiris la tre utilan laboron de la esperantistoj kaj deklaris pretecon helpi ilian agadon, subteni la disvastigon de Esperanto en siaj lernejoj, kuraĝigi la instruistojn lerni kaj instrui la lingvon. Ili dankis pro la klareco, kiun ili ricevis rilate al Esperanto, ne mankis tamen riproĉoj kial oni ne aranĝis pli frue similan renkontiĝon. Estis faritaj ankaŭ bonaj rekomendoj: ke komenciĝu regula intima kunlaborado kun la Komsomolo, inkluzive kun ties CK; ke oni faru proponon al la Ministerio de Popola Klerigo pri pli frua komenciĝo de la E-instruado — jam en la 5-a klaso, kiam la infanoj ne estas tiel multe ŝarĝitaj per studmaterialo; ke estu pli bone organizita la preparo de E-instruistoj en universitatoj kaj superaj lernejoj ktp.

Bedaŭrinde, ne venis ĉiuj invititaj direktoroj de la lernejoj ligitaj kun UNESKO, ĉar speciale lernantoj el tiuj lernejoj akre bezonas kontaktojn kun similaj lernejoj en alilando.

Tamen tiu unua paŝo montris al ni la ĝustan vojon kaj ni nepre utiligos ĝin en nia estonta laboro.

ZORA OŜANSKA

METODIKA E-KONFERENCO

La 19-an de novembro 1983 la Sofia Distrikta Estraro de BEA organizis valoran metodikan E-konferencon en urbo Slivnica, kiun partoprenis geinstruistoj kaj gelernantoj el la distrikto.

La konferenco komenciĝis per malfermita leciono en la loka Meza Politeknika Lernejo fare de k-dino Miĥajlova, instruistino de franca lingvo en la sama lernejo. En la okazinta pridiskuto oni unuanime donis altan pritakson al la leciono. Al la instruistino oni rekomendis apliki pli vaste la kolektivaniĥoran respondadon, batali kontraŭ la forta reduktado de la neakcentitaj vokaloj ĉe kelkaj lernantoj, strebi pli obstine al paroligo de la lernantoj. Oni rekomendis ankaŭ konstantan aplikon de E-kantoj.

Post la pridiskuto de la leciono estis solene enmanigitaj diplomoj pri instruarĵo de Esperanto al 19 geinstruistoj el la distrikto. En la nomo de CE de BEA la novaj E-instruistoj estis salutitaj de K. Vălev, ĝenerala sekretario de BEA. Li substrekis la ĉefajn kaj aktua-

lajn taskojn starantajn antaŭ ili: ne nur krei esperantistojn, eduki patriotojn, internaciistojn, humanistojn kaj pabatalantojn, sed ankaŭ prepari ilin por partopreno en nia amatora artagado. Aparte K. Vălev emfazis la neceson fondi E-klubojn de lernantoj en ĉiu lernejo, kie Esperanto estas instruata fakultative aŭ en studrondeto.

La partoprenantoj en la konferenco prenis decidon, ke oni proponu al la Ministerio de Klerigo enkonduki la E-instruadon ekde la 5-a klaso, kiam la lernantoj ne estas tiel multe ŝarĝitaj kiel en la 9-a klaso.

Grupo de lernantoj el Botevgrad kaj ilia E-instruistino Stamenka Dimitrova prezentis belartan programon el deklamadoj kaj kantoj. Aparte agrablan impreson faris la kvaropo de kantistoj kun gitaroj.

La Distrikta Metodika E-Konferenco en Slivnica estis sendube pozitiva paŝo sur ĝusta vojo. Similajn konferencojn devas organizi ĉiuj distriktaj estraroj en la lando.

K. V.

Rezultoj de la Literatura Konkurso de „BE“ — 83

Okaze de la 60-a datreveno de la Septembra Ribelo 1923, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncis en n-ro 12/1982 grandan literaturan konkurson.

La ĵurio en konsisto: Hristo Gorov, Ljuba Bojaĝieva kaj Dončo Hitrov — studis la ricevitaĵojn konkursojn kaj aljuĝis premiojn al jenaj aŭtoroj kaj verkoj:

ORIGINALA POEZIO

II premio — 40 levoj: Atanas Krumov Kostadinov el Plovdiv („1923 jaro. . .“)

Kuraĝiga premio — libro: Boris Petrov Kavalĝiev el Ruse („Honore al herooj-septembruloj“)

ORIGINALA PROZO

I premio — 50 levoj: N. Georgieva el Sviŝtov („En la jaro 1923“)

III premio — 20 levoj: Ivan Ŝivarov el Plovdiv („La

rememoroj reviviĝas“);

Boris Petrov Kavalĝiev el Ruse („Kion mi vidis post la frakaso de la ribelo. . .“)

MUZIKAJOJ

Kuraĝiga premio — libro: Petja Dimitrova Janeva el Burgas („Estas unu kanto. . .“ kaj „Noktoj blankaj“).

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la premiitajn aŭtorojn kaj bondeziras al ili novajn sukcesojn. Al la aŭtoroj, kies verkoj ne estis premiitaj, ni deziras pluan obstinan laboron, por ke ankaŭ ili atingu veran majstrecon.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn-verkemulojn pli vigle partopreni niajn literaturajn konkursojn kaj speciale la jam anoncitan en n-ro 12/1983 de „BE“ konkurson lige kun la 40-a datreveno de la venko de l'socialisma revolucio en nia lando.

„BULGARA ESPERANTISTO“ PLU ABONEBLA!

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ sciigas al ĉiuj interesigantoj, ke la asocia organo estas plu abonebla.

Tiuj el vi, kiuj ne sukcesis aboni por 1984 per REP, povas fari tion sendante per poŝtmandato 3 levojn al la adreso de la redakcio: 1303 — Sofio, bul. Hristo Botev 97. Sammaniere povas fari sian abonon ankaŭ alilandanoj.

La abonkotizo — 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Oni skribu sian ĝustan adreson, indikante ankaŭ la poŝtkodon.

Ne preterlasu la eblecon aboni nian riĉenhavan kaj interesan revuon.

Ĉiu membro de BEA — abonanto de „Bulgara Esperantisto“!

LA REDAKCIO



FRUKTA VESPERO EN KJUSTENDIL

La Distrikta Estraro de BEA — Kjustendil, dezirante popularigi la fruktokulturadon — baza branĉo en la agrikulturo de la distrikto, en oktobro organizis E-renkontigon „Frukta Vesperto“. Ĝi estis dediĉita al la 60-jara jubileo de la Septembra Ribelo 1923 kaj al la pacbatalo.

La 8-an de oktobro oni vizitis la pentrajgalerion de la mondkonata popola pentristo Vladimir Dimitrov — la Majstro. La ekskursgvidantino Grigorova kompetente konigis al la ĉeestantoj la vivon kaj kreaĵojn de la pentristo.

En la Domo de Popola Armeo okazis packunveno, en kiu ĉeestis ankaŭ multaj civitanoj. Mallongan, sed tre bonan muzikan programon en Esperanto kaj bulgara lingvo prezentis la ensemblo „Verdaj Steletoj“ el Kjustendil — laŭreato de la Internacia Esperanta Recitalo-Konkurso de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio en 1982 kaj 1983. Raporton pri temo „La internacia situacio kaj la taskoj de la esperantistoj en la pacbatalo“ faris Dimităr Haĝiev, prezidanto de la bulgara MEM-komitato. Oni akceptis tekston de telegramo al la Ĝenerala Sekretario de UN, en kiu estas kondamnataj la imperiistaj provoj komplikigi la internacian situacion per lokigo de novaj nukleaj raketoj en Eŭropo.

Dum la amika vespermango la partoprenantojn salutis Maria Labova, vicprezidanto de DE de BEA — Kjustendil. Sur la tablo estis multaj orkoloraj kaj sukriĉaj pomoj. La muziko de blovorkestro estigis bonhumoron kaj la vespero finiĝis per kantoj kaj rondancoj.

La sekvan tagon la esperantistoj vizitis la vilaĝojn Dragoviŝtica kaj Siŝkovci. En Dragoviŝtica oni konatigis kun la historio kaj revoluciaj bataloj de la vilaĝo. Estis projekciita dokumenta filmo pri la grandaj sukcesoj en la fruktokulturado. La partoprenantoj trarigardis aranĝitan de la esperantisto Jordan Gulev „Domon de la paco kaj humaneco“. Per multaj aforisimoj kaj pensoj de grandaj homoj, skribitaj sur la muroj de la konstruaĵo, senmaskiĝas la malaminda faŝismo kaj la militamantoj.

En Siŝkovci estis vizitita la Domo-monumento de Vl. Dimitrov — la Majstro. Krom la pentraĵoj en la aranĝita ekspozicio oni trarigardis la konstruaĵon, en kiu dum 23 jaroj loĝis kaj kreis la popola pentristo, multjara membro de la Monda Packonsilio. Li vivis tre modeste, kaj la monumojn de venditaj pentraĵoj la Majstro disdonis al malriĉaj vilaĝanoj kaj infanoj.

Ni esperas, ke la renkontigo firmiĝos kiel regula jararango. Ĉi-jare ĝi estis vizitita de esperantistoj el Sofio, Samokov, Jakoruda, Razlog, Kneja k.a. loĝlokoj, kaj estonte ni havas ambicion altiri partoprenantojn el la tuta lando kaj el eksterlando.

EVTIM ANĈEV,
sekretario de DE de BEA-Kjustendil

INTERDISTRIKTA E-RENKONTIGO

En oktobro k.j. en Miĥajlovgrad laŭ invito de la loka medicina E-societo „D-ro Stamen Iliev“ kaj lige kun la 60-jariĝo de la Septembra Ribelo 1923 venis gastoj el Loveĉ.

Oni vizitis lokojn, ligitajn kun la revolucia pasinteco de Miĥajlovgrad-distrikto: la memorejon en Balova Suma, muzeojn kaj ekzekutlokojn en Gavril Genovo kaj Georgi Damjanovo, Lopuŝanski-monahojn. En Miĥajlovgrad estis vizititaj la Muzeo de Septembra Ribelo, la Domo-muzeo de Hristo Miĥajlov kaj Obelisko ĉe la urbo, kie oni signalis la ribelon en 1923. Oni metis florojn antaŭ la busto-monumento de d-ro Stamen Iliev — patrono de la distrikta hospitalo kaj de la medicinista E-societo, ĉefkuracisto de la ribelula malsanulejo de la unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo. Krom tio, la gastoj aŭskultis prelegon pri la historia evoluo de Miĥajlovgrad.

Okazis amika vespermango de reprezentantoj el la tri distriktoj: Vidin, Loveĉ, Miĥajlovgrad — de la urboj Lom, Trojan, Vidin, Loveĉ, Miĥajlovgrad. Estis interŝanĝita valora sperto. Parolis Vera Ivanova, Ĉoĉo Kolarov, Ivan Liŝev, Nikola Anastasov, d-ro Tjuran Omer, Verĵinija Dokova, Elenko Todorov. La gastoj ricevis donace kompletojn kun albumo, insigno kaj kantoj pri Miĥajlovgrad, almanako „Ogosta“ k.a.

La amikaj rilatoj inter la E-societoj el Loveĉ kaj Miĥajlovgrad plu daŭros per ankoraŭ pli proksimaj kontaktoj kaj reciproka kunlaboro.

NATALIJA TIŠKOVA

KVARA KAŬTANA E-VEPERO

La E-societo „Esperanto triumfonta“ — Petriĉ, okazigis en montodomo „Belasica“ sur la samnoma monto la Kvaran Kaŝtanan E-Vesperon. Partoprenis 140 esperantistoj kaj gastoj el 18 E-societoj.

Estis prezentita riĉa literatura-muzika programo de ĥoro „Junpionira Eho“ ĉe lernejo „Koĉo Mavrodiev“ — Petriĉ, kun artgvidanto Ivan Apostolov, prezidanto de la loka E-societo; partoprenis ankaŭ amatoroj ĉe la legejo en v. Ĵarnalovo. La veteranoj-esperantistoj Georgi Andreev kaj Timĉo Guŝtarov variigis la programon per malnovaj E-kantoj.

Dum la amika vespermango laŭ tradicio estis ankaŭ fruktoj: kaŝtanoj, granatoj, ternuksoj.

En sia salutparolo Stojan Kostadinov, membro de CE de BEA, emfazis la grandan signifon de la kaŝtanaj renkontigoj kaj dankis al la organizantoj pro la bona organizo. Impresojn pri la bona iniciato dividis ankaŭ esperantistoj el Blagoevgrad, Kjustendil, Bjala, Jambol k.a.

La sekvan tagon oni aranĝis ekskurson por kolekti kaŝtanojn en la arbaroj de monto Belasica.

KIRIL ĤLEBAROV

NOVAJOJ EL PAZARGIK

La E-societo „Radio“ en sia jarkunveno elektis d-ran Ivan Ĉunĉev prezidanto kaj Metodi Dimitrov vicprezidanto.

En la Domo de Esperantisto okazis vespero, dediĉita al la E-veteranoj. Salutparolis Petko Arnaudov, prezidanto de DE de BEA — Pazargik. Pro multjara aktiva E-agado per honora insigno de BEA estis distingitaj: Krăstju Radkov, Krăstju Ĉergarov, Konstantin Ĝenĉev, Veliĉko Veliĉkov, Krăstan Bonev kaj Stefan Damjanov.

En la urbo funkcias du kursoj. Inĝ. Maria Hristova gvidas kurson por komencantoj, kaj Magdalina Georgieva — kurson por progresintoj.

KONSTANTIN ĜENĈEV

En Kolarov-subdistrikto de Sofio la 11-an de novembro k. j. en la junulara domo „Lilija Karastojanova“ oni solene malfermis la novan 1983/84 lernejon de fakultativa instruado de Esperanto en la mezlernejoj.

La solena kunveno estis malfermita kaj gvidata de ing. Ivan Pacov, vicdirektoro de la subdistrikta Interlerneja Centro por Labor-Politeknika Instruado. Paroladon pri la Internacia Lingvo Esperanto kiel lingvo de la paco kaj amikeco, kiel rimedo por internacia kaj patriota edukado faris Kunčo Válev, ĝenerala sekretario de BEA. Estis prezentita mallonga belarta programo en Esperanto, en kiu partoprenis la merita aktorino Conka Miteva, la operkantistino Maria Angelova, Nevjana Krásteva kaj infana grupo el la Baza Tuttaga Infangardeno № 152 kun gvidantino Maria Manolova.

Oni akceptis kompleksan programon por plivastigita instruado de Esperanto en Kolarov-subdistrikto, akordigita kun la Subdistrikta Konsilantaro „Popola Klerigo“, Subdistrikta Konsilantaro pri Kulturo, Subdistrikta Komitato de la Komsomolo kaj la Urba Estraro de BEA — Sofio. En la subdistrikto oni enkondukas eksperimentan E-instruadon en du bazaj infangardenoj. En la fundamentaj lernejoj estos aplikataj eksterklasaj instruformoj; en 101-a baza lernejo oni fondos klubon „Juna Esperantisto“. Eksperimente funkcios po unu E-klaso el la 9-aj klasoj en 16-a kaj 29-a Unuecaj Politeknikaj Mezlernejoj (ESPU), kies instruado funkcias konforme al instruplano, aprobita de la Ministerio de Popola Klerigo. Ĉe leĝejo „Stilijan Peŝev“ oni organizas miksan grupon rilate la aĝon, en kiu Esperanton lernos infanoj kaj ĝejnuloj, en kies lernejoj la Internacia Lingvo ne estas instruata.

La plenumo de la kompleksa programo supozigas, ke dum 3—4 jaroj oni preparos junajn esperantistojn, posedantajn bone Esperanton. En kunlaboro kun la Subdistrikta Komitato de la Komsomolo — Kolarov-subdistrikto kaj la Urba Estraro de BEA — Sofio, estas ellaborata konkrita programo pri la funkciado de Esperanto kiel faktoro por komunisma kaj internaciisma edukado en la subdistrikto.

E. G.

VESPERO DE LA AMIKECO

En la klubejo de E-societo „Vekigo“ — Sumen, okazis vespero, dediĉita al la amikeco inter la bulgara kaj germana popoloj.

D-ro Ĵelez Tonev, sekretario de la societo, parolis pri la nacia festotago de Germana Demokratia Respubliko, pri la 34-a datreveno de la unua germana ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj. Pli ol 10 jarojn la esperantistoj el la ĝemelurboj Sumen kaj Magdeburg havas fruktodonajn ligojn — per korespondado, interŝanĝo de ĵurnaloj, reciprokaj gastadoj. La subskribita kontrakto pri kunlaboro celas reciprokajn interkonatiĝon inter la esperantistoj el la du urboj, disvastigon de la amikeco kaj reciprokajn agadon en la pachtatalo.

Kun intereso la ĉeestantoj trarigardis ekspoziciitajn materialojn — leteroj, suveniroj, ĵurnaloj kaj gazetoj, ricevitaj de germanaj amikoj. Fine ĉiuj subskribis salutleteron al la esperantistoj kaj urbanoj de Magdeburg okaze de la nacia festotago.

CVJATKO TODOROV

Laŭ n-ro 1983-06 de Novajletero de nia Novjorka Oficejo, grupo da oficistoj de UN, kiuj en kurso lernis Esperanton, regule renkontas unu la aliajn.

Ĉiujauĉe tagmeze en la unuaetaĝa rapidmanĝejo de la Ĉefoficejo de UN oni povas vidi verdan flageton sur unu el la tabloj, ĉe kiu homoj babilas Esperante. Inter ili estas spertaj parolantoj kiel ekzemple anglalingva tradukisto s-ro Aleksandro Sūorc kaj redaktistino de la Statistika Oficejo s-ino Roŝel Grousmn, kaj ankaŭ komencantoj kiel sekretariino s-ino Marta Bergonzoli aŭ ĉinlingva tradukisto s-ro Ŭu Apolo. La spertuloj ĝoje funkcias kiel neformalaj instruistoj.

La ideo kreigis el unu el la Esperanto-kursoj, kiujn s-ro Guljius Mansn (doktoro; membro de la Administra Komitato de la Novjorka Oficejo) gvidis. La eks-gekursoj deziras daŭrigi tiamaniere Esperante babili.

La Esperanta Konversacitablo iĝis reklama en la ĵurnalo Bulteno de la diplomata mondo (Diplomatic World Bulletin), vaste legata de Novjorkloĝantaj diplomatoj.

(El „UN kaj ni“, n-ro 30/1983)

VI PORPACA E-KUNVENO EN ĈSSR

De la 23-a ĝis 25-a de marto 1984 en Pardubice, kiu situas 100 km oriente de Prago, okazos la VI Porpaca E-Kunveno. De jaro al jaro kreskas la intereso pri tiu arango. Pasintjare pli ol 300 personoj diskutis, sed ankaŭ ĝuis altnivelan kulturen programon, vespere amuziĝis, dancis, tage vizitis muzeojn, fabrikojn, vilaĝon Lejaky, trarigardis la urbon.

Venu kaj kunligu viajn manojn kun la niaj. Demonstru, ke la esperantistoj staras en la unuaj vicoj de pacdefendantoj. Ni havos bonajn kaj tamen ne multekostajn kondiĉojn.

Ni loĝos kaj manĝos en studenta hejmo apud Kultura Domo Dukla, kie okazos la arango. La programo komenciĝos vendrede matene kaj finiĝos dimanĉe posttagmeze. Al la dezirantoj viziti Pragon ni helpos per loĝigo kaj E-ĉiĉerono.

Prezo por loĝado kaj manĝoj (du tranoktoj, manĝoj trifoje tage dum du tagoj) — 195 ĉeĥosl. kronoj. En la sumo estas enkalkulitaj: enirbileto por balo, buso, suveniroj kaj dokumentoj.

Informas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-110 01 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

SVISA RADIO INTERNACIA

La elsendoj de Svisa Radio Internacia en Esperanto okazas lunde, ĵauĉe kaj sabate de 20.00 ĝis 20.10. kaj de 22.30 ĝis 22.40 bulgara tempo sur la mallongaj ondoj 75.28, 48.60, 31.46 metroj respektive 3.985, 6.165, 9.535 MHz.

Nia adreso: Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 BERN 15, Svislando.

RADIO ZAGREB (1953—1983)

Establita kiel unu el la informaj kanaloj pri novaĵoj, rilatantaj la zagreban Universalan Kongreson de Esperanto en 1953, elsendoj jen funkcias regule 30 jarojn. Ĉiam en malfrua horo, ĉiam nur 15-minuta daŭro unufoje semajne. Ankaŭ nun. Aŭskultantoj estas ĉie en Eŭropo.

Radio Zagreb atendas ankaŭ vian subtenon. Aŭskultu ĝian programon en meza ondolongo 262 m, merkredon je la 00.45 horo laŭ bulgara tempo. Estas tre komforte kuŝi en la propra lito kaj aŭdi E-novaĵojn.

EMILIJA LAPENNA

RADIOAMATORAJ KONTAKTOJ

Tempoj kaj frekvencoj por radioamatoraj kontaktoj en Esperanto. Ĉiuj tempoj estas laŭ Griniĉa Meza Tempo (=Universala Tempo):

Ciutage — 8.00 horo — 7066 KHz
Sabate kaj dimanĉe — 12.00 horo — 21266 KHz
12.30 horo — 14266 KHz
0.00 horo — 14266 KHz
(renkontiĝoj de brazilaj radioamatoroj)
Lunde kaj vendrede — 16.30 horo — 14266 KHz

JOSEF WEIDACHER (FRG)



Bulgaraj infanoj-esperantistoj el Blagoevgrad, kiuj somerumis en la infanurbeto Zanka, Hungario

INVITO AL BIKIKLADO EN GDR

La bicikla aranĝo okazos inter la 20-a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro 1984 kaj konsistas el tri programoj:

1. Junulara Esperanto-Tendaro (JET) en la tendumejo Markgrafenheide — 20—24-a de aŭgusto.
2. Bicikla migrado en kvin etapoj:
 - a) 24. VIII. — ekbiciklado de Rostock-Warne-münde al Stralsund (tendumejo 0123/Altefähr) — 73 km.
 - b) 25. VIII. — de Altefähr al Greifswald (tendumejo Galkow /0143) — 45 km.
 - c) 26. VIII. — al Ückermünde (tendumejo C 101) — 70 km
 - d) 27. VIII. — al Prenzlau (lernejo) — 60 km.
 - e) 28. VIII. — al Thomsdorf (tendumejo C 086) ĉe Somera Esperantista Familia Tendaro (SEFT) — 40 km

3. Partopreno en SEFT—84 (28. VIII — 01. IX.). Se estas dezirantoj, mi arangus posttendumadon en Templin (je 30 km de Thomsdorf). Se vi volas tion, bonvolu informi min antaŭe.

Kondiĉoj: propra, bone funkcianta biciklo; tendo (ankaŭ eblus kolektive uzi unu tendon); dormosako; matraco.

Partoprenkotizo: 10. — M (antaŭe sendendaj).
Organizanto: Ronald Schindler,

GDR — 2090 Templin,
Wilhelm-Pieck-Straße 44.

NI RECENZAS

ATENTOKAPTA LIBRO

La fenomeno Svislando, Arthur Baur, Romanshorn:
Svisa Esperanto-Societo, 1979. 144+24 p. Ilus. 19 cm.

„La fenomeno Svislando“ estas belaspekta libro, kiu prezentas Svislandon, kaj la prezentado okazas pere de flue legebla rakonto, en kiu Arthur Baur montras sian ĵurnalistan talenton. La ĉapitro pri ekonomio, kiu konsistas precipe el ciferoj, donas tre interesan analizon pri la mistero de svisa riĉeco kaj alta viv-nivelo, pri kiuj oni ofte parolas en eksterlando. En la libro ekvilibrite estas prezentitaj multaj flankoj de la svisa fenomeno — historio, politiko, ekonomio, kulturo kaj aktualaj problemoj. La aŭtoro strebas emfazi la esencon, klarigi la kialojn kaj evolutendencojn, kaj persone pritaksas bonajn kaj malbonajn aferojn en sia lando. Sed fakte li pli multe akcentas la pozitivajn trajtojn de la svisa socio.

La ĉapitro pri kulturo estas tre informriĉa kaj donas klaran bildon pri la lingva kaj kultura situacio en Svislando. Por esperantistoj, kiujn interesas soci-lingvistikaj kaj etnaj problemoj, legado de tiu ĉi ĉapitro estas aparte interesa.

Laŭ A. Baur unu el la elementoj de la svisa realeco estas, ke kvankam la svisa popolo tute ne estas unueca — ĝi eĉ ne posedas komunan lingvon, ĝi tamen estas nacio. La svisa koncepto pri nacio estas politika kaj implicas nacion kaj ŝtatan nedisigeble. En Svislando mankas minoritatoj kaj ne ekzistas lingvaj problemoj — en la svisa federacio la germana, franca kaj itala lingvoj ĝuas plenan egalrajtecon en ĉiuj sferoj de la socia vivo. La retoromanĉoj prezentas malpli ol unu procenton de la svisa popolo kaj pro tio rezignis, ke oficialajn dokumentojn oni traduku en retoromanĉan lingvon.

La libro estas presita sur bonkvalita papero, riĉe ilustrita kaj estas verkita en senpriproĉe flua lingvo.

EVGENI GEORGIEV

distroj

EL „SATIRA ENCIKLOPEDIO“

BARBO

— objekto, kompensanta la mankon de kravato.

ĈEFO

— homo, kiu venas en la oficejon ĝuste kiam vi ne estas tie, kaj tute ne venas, kiam vi laboras.

GEEDZIĜO

— kuraĝa publika diskonigo pri unu intima intenco.

KANIBALO

— homo, kiu serĉas amikojn laŭ sia gusto

UNIVERSALA MAGAZENO

— komerca entrepreno, kie oni vendas ĉion, sed ne ĉion oni povas aĉeti.

NAJBAROJ

— homoj, kiuj scias pri ni pli ol ni mem.

TRANSSKRIBADO

- el unu libro — plagiataĵo
- el du libroj — kompilaĵo
- el tri libroj — doktordisertaĵo
- el kvar libroj — kvina scienca libro.

VIRINA VIVO

— de 18 ĝis 25 jaroj — la sepjara milito de la koro kontraŭ la racio

— de 25 ĝis 55 jaroj — la tridekjara milito de la arto kontraŭ la naturo.

IDEALA EDZO

Du amikinoj interbabilas pri la „ideala edzo“.

— Mi revas, ke Li estu belstatura, ŝatu ĵazmuzikon, alportu al mi ĉiujn novaĵojn, estu kapabla resti hejme kaj silenti laŭ mia komando — diras la unua.

— Kara mia, — respondas la kunparolant-

tino, — en tia okazo vi bezonas ne edzon, sed televidaparaton!

KIES OKULOJ VIDAS PLEJ BONE

Ci tiun demandon oni donis al Diogeno kaj li respondis jene:

— Plej bone vidas la okuloj de la enviulo, ĉar li rimarkas eĉ tiajn ecojn, kiujn oni ne posedas.



SUPO EL LITEROJ

Tiu ĉi kvadrato plena de literoj enhavas ses nomojn de veturiloj. Serĉu ilin.

Por la celo vi povas legi horizontale, vertikale aŭ eĉ diagonale — en ambaŭ direktoj, sed ne transsaltu literojn!

S	O	N	O	I	M	A	K
O	U	S	B	T	I	O	A
S	T	R	I	B	L	I	S
E	L	I	H	K	O	E	L
L	U	C	I	F	I	S	E
A	S	C	E	N	O	R	D
K	I	U	T	R	A	M	O
B	A	L	K	O	N	O	N



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Jordanka Marinova (47-jara instruistino) — 1330 Sofio, kv. „Razsadnika“ bl. 25, vñ. 2, et. 2, ap. 26 — kun ĉl.

Stefan Radev — BG-1199, ĵ.k., „Mladost“ 4a, bl. 6 — 14, vñ. 3, et. 5, ap. 76 — kun ĉl pri aŭtoturismo.

Daniela Avramova (17-jara lernantino) — BG-5000 Veliko Tŕrnovo, kv. „Buzluĝa“ bl. 7, vñ. 7, et. 6, ap. 17.

Stana Radoslavova (28-jara geologino) — BG-8000 Burgas, Meden Rudnik, ul. „Petko Vojvoda“ 5.

Jordanka Baĉvarova (46-jara instruistino) — BG-5000 Veliko Tŕrnovo, bul. „Dimitŕr Ivanov“ 15.

Bano Vâlĉev (24-jara laboristo) — BG-5504 Loveĉ, str. „Ivan Buzev“ 13 — kun ĉl pri moderna muziko, bk, pm kaj gramofondiskoj.

Maria Ivanova (30-jara oficistino) — BG-7100 Bjala, str. „Porojna“ 1 — kun ĉl pri ĉt.

Cvetan Manojlov (28-jara fraŭlo, elektromedicina teknikisto) — BG-3400 Miĥajlovgrad, str. „Mito Vereniŝki“ 59.

Petŕr Mateev (24-jara studento de medicino) — BG-9000 Varna, str. „Bratja Miladinovi“ 68, vñ. G — pri psikologio, lingvoj, literaturo, arto, bk, afiŝoj, antikvaĵoj.

75 ĝelernantoj (14—17-jaraj) atendas viajn leterojn. Adreso: Polski Trâmbeŝ, Politeknika gimnazio (Esperanto), E-societo „Hristo Kozlev“, p.k. 61 — kun ĉl. Respondoj tuj.

D-rino Veselina Skorĉeva, — BG-9000 Varna, bul. „Karl Marks“ 36 A — kun ĝepentristoj de teksaĝobelinoj, teksaĝaj bildoj, trikaĝoj, brodaĝoj k.a.

Stanka Dimitrova Georgieva (50-jara teknologino) — BG-1309 Sofio, str. „Car Simeon“ 243 A/19.

Rosica Georgieva (22-jara), zavodski blok 24, et. 3, ap. 9, BG-5500 Loveĉ.

Georgi Ganev (lernanto en V klaso), OP „Ambalaj“, BG-5500 Loveĉ.

Neli Hristova (20-jara), str. „Muletarov“ 25, bl. „Lenin“, ap. 41, BG-5500 Loveĉ.

Emilia Toceva (17-jara), bl. 201, vñ. D, et. 2, ap. 3 — kolektas bildkartojn kaj insignojn.

Nevenka Boneva, bl. „Mladost“, ap. 509, BG-5500 Loveĉ.

Zoja Cvetanova Miĥajlova (18-jara), str. „Miladin Kunĉev“ 54, BG-3400 Miĥajlovgrad — kun ĉl pri ĉt.

Plamen Todorov Cvetkov (16-jara), SMU „Siroka lâka“, v. Siroka lâka, distr. de Smoljan — kun ĉl pri ĉt.

Cvetanka Borisova (16-jara), str. „Minjor“ 65, BG-2350 v. Divotino, distr. de Pernik — kun ĉl pri sporto.

Georgi Ivanov Georgiev, bl. 24, ap. 26, BG-3320 Kozloduj — kun ĉl pri turismo, fotografio, sciencfikcio kaj vojaĝoj, kolektas kaj interŝanĝas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj diapozitivojn.

Elena Simeonova (17-jara), kv. Lozen, str. „G. Dimitrov“ 61 A, BG-1751 Sofio — kun ĉl pri ĉt.

Kapka Miladinova (17-jara), str. „Car Simeon“ 183, BG-1309 Sofio — kun ĉl pri ĉt.

Du fratinoj Petja Stoeva (studentino) kaj Verka Stoeva (15-jara), kv. „Hr. Smirnenŝki“, str. „598“ 11 — kun ĉl pri ĉt.

Vasil Sâbev (32-jara), v. Brestovo, distr. de Loveĉ. Ĝesperantistoj el Loveĉ deziras korespondi kun ĉl:

Georgi Petrov Georgiev (38-jara), bl. 202, vñ. E, ap. 16, BG-5500, Loveĉ.

Borislavka Veseliĥova (22-jara), str. „Kirili Metodi“ 41, BG-5500 Loveĉ.

Valentina Stefanova (21-jara), bl. 207, vñ. G, ap. 23, BG-5500 Loveĉ.

Ivan Marinov Stojanov (gimnaziano), zavodski blok 25, et. 3, ap. 12, BG-5500 Loveĉ.

POLLANDO

Sofia Grzelak (25-jara studentino) — PL—05-462 Radiowek 15, Skr. Pocz. 53, woj. Warszawa — pri libroj, lingvoj, teatro, ekskursoj, kolektas bk.

Milosz Wroblewski (23-jara teknikisto) — ul. Maczewskiego 35 m 35, PL — 93-154 Lodz — pri historio, literaturo, arto, filmoj, sporto.

Krupa Zdzislaw (36-jara instruisto de sporta edukado) — ul. 22 Lipca 3/11, PL — 66-110 Babimost — kun ĉl pri ĉiuj temoj, kun diversagaĵoj; kolektas pm, monerojn.

HUNGARIO

Gabriella Tekulics (20-jara bibliotekistino), H-1117 Budapest XI, Orly utca 8 — kun ĉl pri ĉt, kolektas informojn pri la E-movado kun bonkvalitaj fotoj.

Gabriella Soŝ (16-jara), Pŭspŭkladany 4151, Hôsôk tere 2. szam. — kun ĉl pri ĉt.

Kulin Laszlo (30-jara), H-1152, Budapest, Arany Janos 40 — kun ĉl pri ĉt.

Budaj Gizella (lernantino en VII klaso), H-3910 Tokaj, Lenin ut 36 — kun knaboj el ĉl.

SOVET-UNIO

Grupo el 17-ĝis 55-jaraj ĝesperantistoj deziras korespondi tutmonde. Adreso: Ivassenko Anatolij Iv. a/kesto — 461, Krasnodar — 27.

Lehti Illisson (instruistino) — SU-202455 Kurekŭla, Tartu raj., Estonio — pri E-instruado, edukado, kantoj kaj serĉas adresojn por siaj ĝelernantoj 10—12-jaraj.

Madis Tammemägi (14-jara lernanto), SU-200013 Tallinn, Vindi 8-17, Estonio — pri korbopilko kaj aliaj sportspedoj.

Meelis Saaresalu (14-jara lernantoj), SU-200026 Tallinn, Vilde tee 121A-58, Estonio — pri sporto, ŝako, Esperanto.

Tarmo Uustalu (14-jara lernanto) — Vilde tee 107—14, SU-200029 Tallinn, Estonio — kolektas E-revuojn, anekdotojn, mallongajn rakontojn.

Katrin Koor (14-jara lernantino), SU-200016 Tallinn, Tâhe 40—6, Estonio — pri sporto, pm, bk, Esperanto.

Valerij Maliĥin (22-jara nova esperantisto) — Per. Vuzovskij 16, kv. 83, SU-660025 Krasnojarsk — kun ĉl pri ĉt.

Valerij Perikov — SU-652870 Mejdureĉensk, Kemerovskaja obl., pr. „50 let komŝomola“ d. 4. kv. 27.

E-klubanoj en Soĉi (10—12 kaj 20—28-jaraj) — komuna adreso: SU-354054 Soĉi, p. k. 264, Esperanto-Klubo — kun bulgarioj pri ĉt.

Hilje Pakats (ekonomiistino) — SU-200009 Tallinn, Saha 23, Estonio — pri lingvoj kaj ekonomio.

Ing. Juhan Soovares — SU-200013 Tallinn, Tuisu 18—19, Estonio — pri ŝako kaj konstruado.

Gintaras Ziaunys (16-jara) — SU-235500 Mazeikiai 1, str. Zemaitijos 9—25, Litovio — kun ĉl.

Torbik Vjaĉeslav (18-jara studento-filologo) — SU-656015 Barnaul 15, abon. k. 801 — kun ĉl pri lingvoj, sporto, moderna muziko, interŝ. BK, insignojn. Ankau en angla kaj rusa lingvoj.

Aleksandro Gonĉarov (17-jara) — SU-357560 Pjâtigorsk, ul. Sadovaja, 18, p. Gorjaĉevodskij — kun ĉl.

SPORTO

Triumfo de gracio

Jen kelkaj opinioj pri la partopreno de la bulgaraj gimnastinoj en la Monda Ĉampioneco pri Belarta Gimnastiko fine de 1983 en Strasbourg (Francio):

„L' Humanite“: „Evidente, la bulgaraj gimnastinoj, kune kun siaj sovetiaj konkurantinoj sur la paca kampo de sporto, jam estas etalono por la sukceso de ĉiu mondĉampioneco pri belarta gimnastiko.“

„Dernière Nouvelle“ (Strasbourg): „8000 spektantoj aŭtate konkeris la sidlokojn en la halo por partopreni en la apoteozo de la belarta gimnastiko. La bulgarinoj prenis sur sin la taskon prezenti al ili spektaklon kaj kroni sian superecon, kiu kreskis kun ĉiu nova plenumo... Bulgario — tio estas la perfekteco en nia mondo.“


La Franca Televido komencis unu el siaj emisioj el Strasbourg per la vortoj: „Belege, nepritakseble, nepriskribeble!“

„Figaro“: „La bulgarinoj prezentis al ni belegan spektaklon.“

(El la francaj amaskomunikiloj)



Diljana Georgieva — absoluta mondĉampionino de belarta gimnastiko



La bulgaraj „oraj knabinoj“ — la nacia teamo de belarta gimnastiko

Foto: Petăr Spasov

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV
Vicĉefredaktoro: Haim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI,
Radoslav DOJČINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr
HAĜIEV, Krăstju KARUCIN

Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919,
distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado.
Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97 P. K. 66

1303 Sofio, Bulgario 1 000 Sofio
tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117